


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

Vicedaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Stefan MacGill

ENHAVO

<i>Estraro en hungara urbo</i>	1
<i>35a Internacia Infana Kongreseto en Fortaleza (BR)</i>	6
Radojica PETROVIC': <i>Malĉeesta kaj ĉeesta lernado per la Interreto en la projekto Interkulturo</i>	8
Ilona KOUTNY: <i>Universitata instruado kaj instruista trejnado</i>	13
Irina GONĈAROVA: <i>Konatiga Esperanta Kurso „Faru la rondon”</i>	21
Ronald J. GLOSSOP: <i>Pri nova epoko</i>	25
<i>E. Vilisics Formaggio: Ludu kun ni! 2.</i> (recenzo de Katalin KOVÁTS).....	34
<i>FIPLV kaj ILEI kunlaboras</i> (Jennifer BISHOP)	35
<i>El la landoj kaj sekcioj (FR)</i>	36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <m.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it>
Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érđ, Hungario. Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>
Eldona agado (inkl. periodaĵojn).

Sekretario: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150)52387 kaj (+46)708152387 (mesaĝoj). <agneta.emmanuelsson@liberal.se>
Membraro, sekcioj, komitato.

Vicsekretario: Sabine Trenner, Ruppinstrasse 8, DE-14770 Brandenburg / Havel, Germanio. Tel. (+49 3381) 794312. <trine@snafu.de>
Rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Estrarano: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>
Lernejoj projektoj, universitata agado.

Estraro en hungara urbeto


Post longa senkunsida periodo, la nove konsistigita estraro de ILEI sukcesis kunsidi inter la 16a kaj 18a de novembro en Érđ, antaŭurbo de Budapeŝto, Hungario. Partoprenis ĉiuj ses nuntempaj estraranoj, kun partopreno de la redaktoroj de IPR, Juna amiko, la nova administranto de tiu lasta, kaj aliaj kunlaborantoj de la Ligo. Ni atendigis la limdaton de ĉi tiu IPR, por povi telegraf-stile raporti la rezultojn.

Sekcioj

- ◆ ĝisdatigi petilon por kandidatigo de novaj sekcioj.
- ◆ Plusendi al la komitato aliĝpeton de korea sekcio kun pozitiva rekomendo.
- ◆ Dissendi al sekcioj enketilon por faciligi la statute postulatan ĉiujaran raportadon.
- ◆ Kadre de tio akiri aktualajn membrolistojn de ĉiuj sekcioj, i.a. por glatigi la dissendon de IPR.

Financo:

- ◆ Prezenti subvencieblajn aspektojn de niaj projektoj, ĉar la membrokotizoj apenaŭ kovras la liveron de la bazaj servoj.
- ◆ Difini pli klare la funkciadon kaj principojn de la koleghelpa kaso.



Nova **memor** -helpilo

www.lerni.info

- por enmemorigi vortojn.
- taŭgas pli bone por lerni Esperanton ol por lerni iun alian lingvon.

(Pagita anonco)

Konferencoj

- ◆ La estraro kun bedaŭro anoncas ke **ne povos okazi ILEI-konferenco en 2002**; anstataŭe proponos pli riĉan edukan programon kadre de la Universala Kongreso kaj la "Tago de la Lernejo", i.a. por atenti la dezirojn de la brazilaj kolegoj. La nuligon kaŭzas ĉefe la maleblo garantii sufiĉan partoprenantaron.
- ◆ La estraro same kun bedaŭro akceptas la demision de la estraranino pri konferencoj, kaj kunlaboros kun la elekto-komisiono trovi novan oficanton, difinante la taskojn kaj bezonojn.
- ◆ Ni esprimas koran dankon al Jennifer Bishop pro la multa kaj zorga planado de niaj lastaj konferencoj, kaj ŝia simpatia surloka gvidado.
- ◆ Planoj bone progresas por starigo de konferenco en Svedio en 2003.

Komitato

- ◆ La konsisto de la komitato estos aktualigita kaj starigitaj estos manieroj rete kaj koresponde funkcii, i.a. revigligo de la diskutejo ILEI-KOM.
- ◆ La komitato de ILEI povos esti, manke de konferenco en 2002, kunvokita kadre de la UK.
- ◆ La protokolo de la kunsidoj en Lovran estos videblaj en la hejmpaĝo de ILEI.

Eldonado

- ◆ Eldoni instruistan gvidilon por la lernolibreto *Okulo*, kajero 1. La gvidilo havos similan amplekson kiel la libro por studentoj kaj aperos en 500 ekzempleroj. Ĝi inkluzivos kopieblajn ekzerco-foliojn. Klasoj en Interkulturo povos akiri ĝin je favoraj prezoj.
- ◆ Represi senŝanĝe la duan eldonon de la dua kajero de la serio *Tendaraj tagoj* en mil ekzempleroj.
- ◆ Sekvi la evoluon de ampleksa komunik-stila lerno-pakaĵo pretigita de Josias Ferreira Barboza en Brazilo, ekzemple, faciligante la aperigon per anticipa kvanta mendo flanke de ILEI kaj eble UEA.
- ◆ Aldoni ekstrajn plenkolorajn paĝojn kun fotoj de la infana kongreseto kaj REF al la jubilea centa numero, kiu aperos komence de 2002.

Interkulturo

- ◆ Adapti la funkciadon de la kvazaŭa lernejo, tiel ke lernejoj povu mem loki kaj modifi siajn materialojn. Tio estos inter la taskoj por laborgrupo ĵus fondita en Uppsala teknike evoluigi la lernejon kaj la hejmpaĝojn de ILEI.
- ◆ Multigi la hejmpaĝan bazon de la kvazaŭa lernejo, ĉu per spegulaj paĝaroj, ĉu per dispartigo de paĝoj al aliaj serviloj. Se eble, la novaj gastigejoj troviĝu en universitatoj aŭ similaj lokoj, kiuj per tio ligiĝu al la projekto.
- ◆ Verki tekston en Esperanto por unufolia informilo pri Interkulturo por nacilingva eldonado, unuavice en angla, franca, germana, rusa kaj hispana. Ĝisdatigi kaj reeldoni la esperantan informilon.
- ◆ Firmigi rilatojn kun aliaj interkulturaj iniciatoj, kiel Indiĝenaj dialogoj, Euroscola, Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo kaj Lingvaj Festivaloj. Tio inkluzivu komunan sinprezantan seminarion.



Jen la Estraro, kun la du Redaktoroj en la korto de s-ro MacGill (de maldekstre: Géza Kurucz, Boo Mee Kim-Lindblom, Stefan MacGill, Agneta Emanuelsson, Mauro La Torre, Sabine Trenner, Radojica Petrovic' kaj Jozefo Németh).

Cetera lerneja agado

- ◆ Proksimigi la kunlaboron inter ILEI kaj Interkulturo kun la projekto Euroscola.
- ◆ Starigi kontaktojn kun Unesko-lernejoj en elektitaj landoj, kie la sekcioj kaj aliaj E-instruistoj havas la necesan forton.
- ◆ Fortigi kontaktojn, precipe en tiuj landoj, kun la Unesko-komisiono kaj -klubo.

Informado

- ◆ Modernigi kaj interaktivigi la hejmpaĝaron de ILEI; ke ĝi prezentu niajn bazajn dokumentojn kaj aktualajn projektojn. Ĝi enprenu la funkciojn de la iama sed ne plu funkciigebla ILEI-bulteno.
- ◆ Niaj diskutgrupoj (unue E-INS) permesu realtempan interŝanĝadon de mesaĝoj; kaj klavare, kaj parole.
- ◆ Evoluigi la retpaĝojn de IPR, ke ili prezentu parton de la enhavo de la numeroj.
- ◆ Diskonigi kaj helpi en ampleksigo de la katalogo de lerniloj lanĉata ĉe *edukado.net*. Ligi nian datumbazon ELER kun tiu formota ĉe *edukado.net* por resumi instruan agadon.

Rilatoj kun TEJO kaj UEA

- ◆ Integri la agadojn de UEA, TEJO kaj ILEI sur la eduka kampo interne de unuopaj landoj.
- ◆ Kontribui al okazigo de trejna seminario planata de TEJO, kies grava parto estos trejnado de instruistoj. Tio kontribuos al la projekto 'Flugiloj de facila vento'.
- ◆ Fortigi la rilatojn inter *Kontakto* kaj niaj eldonaĵoj per reciprokaj reklamoj, sinprezentaj intervjuoj kaj revu-interŝanĝoj.
- ◆ Kunlabori kun TEJO kaj UEA pri okazigo de trejnkurso por gvidantoj de la Infana Kongreseto (IIK) antaŭ la IIK en Svedio en 2003.
- ◆ Evoluigi la triangulan kunlaboron inaŭguritan per la nova Plenuma Komisiono por la Strategia Plano, kiu kunigas la prezidantojn de UEA, TEJO kaj ILEI kun la Ĝenerala Direktoro de UEA.



(...Kaj SEN redaktoroj, SED pli proksime al la membraro ☺...)

Universitata agado

- ◆ Starigi oficialajn rilatojn inter ILEI kaj kelkaj universitatoj kun esperanta agado.
- ◆ Arigi informojn per formularo (papera kaj elektronika) por starigota datumbazo por katalogi ĉiujn konatajn universitatajn agadojn kaj kursojn. Ĝi estu interaktiva, tiel ke la instancoj povu senpere ĝisdatigi la proprajn datumojn. Komence la arigitaj informoj estu bazaj, kun ebleco aldoni kolumnojn da pliaj datumoj poste.
- ◆ Esplori la staton de kompilo de informoj pri aperigitaj disertacioj. Se ne jam ekzistas, krei elektronikan katalogon de ekzistantaj kaj troveblaj informoj.

35a Internacia Infana Kongreseto

Fortaleza, aŭgusto 3-10, 2002.

La Infana Kongreseto en Fortaleza havos unikan situon, en ekologia rezervejo. La infanoj povos esplori kaj malkovri la unikajn plantojn kaj bestojn de Brazilo. Por konatiĝi kun tiu loko, vizitu ilian hejmpaĝon [www.reservasapiranga.com.br].

Ĝi situas 5 km de la ejo de la Universala Kongreso, 14 km de la centro de Fortaleza, 10 km de la internacia flughaveno *Pinto Martins* kaj 19 km for de *Park Beach*, renoma amuz-plaĝo kiu povos esti ekskursata celo.

La rezervejo havas komfortajn faciligojn kaj kutimas prizorgi konferencojn kaj aranĝojn. Ĝi havas bonan nivelon de sekureco kaj pureco. Ĝia plena nomo estas la Ekologia Rezervejo Sapiranga (portugale: Reserva Ecológica Sapiranga). Ĝi enhavas 6 malgrandajn kaj unu grandan amfiteatron; kunvensalonon kaj dormoĉambrojn, ĉiuj kun necesejo, duŝo, tablo, vestŝranko ktp. La tereno havas naĝejon, placojn, restoracion kaj preĝejeton.

La brazila E-movado estas juna kaj vigla, kaj inkluzivas familiojn. Jam de jaroj, dum naciaj kongresoj, la brazilanoj organizas infanajn kongresetojn, kun samaj ampleksoj kiel la internaciaj. Ni do povos kalkuli je partopreno de brazilaj infanoj kaj la haveblo de spertaj gvidantoj. Ili multe kantigos kaj ludigos la infanojn. La rezervejo havas terenojn por ludado de futbalo kaj aliaj sportoj.

Eblas promene ekskursi kun ekologia gvidanto tra manglo-tereno, kie videblas diversaj specioj de salakvaj plantoj, bestetoj, birdoj kaj fiŝoj de la rivero Coco. Tio estos unika sperto por infanoj el senmanglaj mondopartoj. La plaĝo de Sabiaguaba troveblas je promena distanco de ĉ. 40 minutoj kaj estos la celo de unu el la kongresetaj ekskursoj. Tio estas mara plaĝo ĉe la enfluejo de la blua rivero.

Ni ekskursos al la Universala Kongreso en la Tago de la Lernejo kaj postagmeze vizitos "Centro Dragão do Mar" kiu estas la plej nova konstruaĵo pri kulturo: ĝi enhavas muzeojn diverstemajn, modern-artan muzeon, regionan art-muzeon kaj observatorion.

Ĉi tiu aranĝo markos unikan antaŭenpaŝon en la historio de la infanaj kongresetoj.

La kotizo inkluzivas loĝigon, tri manĝojn tage kun intermanĝetoj, la programon kaj ekskursojn.

La lando-kategorioj A kaj B estas kiel por la UK; la sumoj estas en eŭroj.

limdatoj	A-landoj	B-landoj kaj Brazilo
31. jan. 2002	135	105
31. marto 2002	165	120
31. majo 2002	195	135
poste	220	165

smg



Kelkaj partoprenintoj de IIK 2001

MALĈEESTA KAJ ĈEESTA LERNADO PER LA INTERRETO EN LA PROJEKTO INTERKULTURO

Prelego de Radojica Petrovic', Teknika Fakultato en Ĉaĉak, Jugoslavio

1. ENKONDUKO

Instruado kaj lernado estas procezo de kunlaboro inter instruantoj kaj instruatoj. Se en ĝi estas uzata interreto, kiel en la projekto Interkulturo, jen bona kialo por paroli pri ĝi en la seminario kies ĉeftemo estas kunlaboro per interreto. Krom tiu teknika elemento, Interkulturo estas interesa ankaŭ el la pedagogia vidpunkto pro specifaj metodikaj problemoj de interkultura edukado kaj kombino de ĉeesta kaj malĉeesta instruado en tre diversaj eduksistemoj disvaste tra la mondo. Ĝi estas projekto de ILEI ekestinta en la sino de Kampanjo 2000 de UEA, sed ĝi lokiĝas en pedagogia laboratorio de la Tria Roma Universitato kiel ĝia esplorprojekto. Post dujara aplikado ĝi vekas pli grandan intereson ol ĉe la komenco, sed ĝia daŭrigo bezonigas pli elastajn kaj pli akuratajn organizajn kaj teknikajn solvojn kun novaj homfortoj.

2. KIALOJ KAJ CELOJ

La projekto Interkulturo ekestis pro eksteraj kaj internaj bezonoj. La eksteraj estas bezonoj de la ekstera medio donantaj ŝancon ke la E-komunumo, responde al tiuj bezonoj, ofertu siajn servojn al la merkato de sociaj projektoj. Tiu oferto rilatas al edukado pri interkultura toleremo kaj paca kunnivado, al flegado de kulturo de dialogo kaj evoluigo de dialogo inter kulturoj, kiuj tiom bezonatas en la aktuala mondo kaj kiuj ĉiam aktueligas la esencan ideon de esperantismo. La internaj bezonoj puŝas al serĉado de konkretaj motivoj por lerni Esperanton, de celoj atingeblaj per ĝi kaj de ŝancoj por daŭre aplikadi ĝin.

Sekve, la celoj de la projekto estas, ke la partoprenantoj:

- renkontu aliajn kulturojn,
- kapablu kompari kulturajn trajtojn kaj vivkondiĉojn kiuj varias laŭloke,

- komprenu diversecojn inter diversaj sociaj medioj,
- lernu toleri aliajn vivkonceptojn kaj
- malkovru kaj komprenu similecojn ĉe siaj kaj aliulaj vivbezonoj, vivkondiĉoj kaj kulturtrajtoj.

La lernado de Esperanto ĉi tie ne estas celo por si mem, sed helpilo por atingi la celojn.

3. KIELOJ

La partoprenantoj de la projekto estas ĉefe klasoj de baz- kaj mez-lernejanoj kun siaj klasestroj - kutime instruistoj de Esperanto. Iliaj ĉefaj aktivajoj en la projekto estas: esplorinterŝanĝo kaj lingvolernado.

La dua aktivajo subtenas la unuan. La unua estas la esenca, ĝi bezonas, alcelas, plimotivigas kaj aplikigas la duan.

La lingvolernado devis esti plej intensa en la unua semestro de la projekto ĝis la lernantoj kapablis uzi la lingvon. Poste la komunikado inter klasoj okupis ĉiam pli kaj pli da tempo.

La esplorinterŝanĝo realiĝas tiel, ke la lernantoj de ĉiu klaso elektas temon pri specifa kampo de kultura geografio (lingvo, muziko, nutrado, vestado, lernado, komunikado, bestaro, tradicioj ktp.), faras kontaktojn kun aliaj klasoj kun la sama aŭ simila intereso kaj interŝanĝas kun ili informojn kaj diversajn materialojn (fotoj, gazetoj, libroj kc.) pri la elektita temo. Poste, surbaze de la kolektitaj informoj kaj materialoj ili komparas la diversajn mediojn el diversaj partoj de la mondo, faras konkludojn kaj prezentas la esplorrezultojn.

Komunikado inter la klasoj okazas per interreto kaj ordinara poŝto, uzante la internacian lingvon. La projekto havas sian komunikmedion en la formo de TTT-paĝaro de virtuala lernejo "Tibor Sekelj" (<http://lps.uniroma3.it/kler>). Ĝi prezentas virtualan renkontiĝejon de realaj klasoj, listigitaj en klasartabelo (<http://lps.uniroma3.it/kler/sekr/klasaro.htm>) kaj prezentataj per propraj paĝoj (virtualaj klasĉambroj). La klasoj lernas Esperanton kaj pristudas la interkulturan materialon en cirkonstancoj de ĉeesta instruado kombine kun rimedoj de malĉeesta instruado. Sur la TTT-paĝoj de virtualaj libra laborejo, biblioteko kaj fakaj metiejoj, kaj aliaj "ejoj" alireblaj tra la paĝo <http://lps.uniroma3.it/kler/halo.htm>

troviĝas ligiloj al diversaj retaj kursoj, bibliotekoj kaj aliaj fontoj de necesaj instru- kaj inform-materialoj. La projekto antaŭvidas ankaŭ retajn diskutejojn, ekspoziciojn kaj aliajn funkciojn de la virtuala lernejo kiuj ankoraŭ ne estas komplete ellaboritaj.


4. REZULTOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

La projekto Interkulturo estis lanĉita per la enkonduka simpozio "Lingva politiko kaj interkultura edukado" dum la UK en Mompeljero 1998. Dum la studjaro 1998/99 daŭris preparoj por la projekto: informado, varbado kaj aliĝado de klasoj, pretigado de la TTT-ejo, verkado de la lernolibro por infanoj "Okulo". Aliĝis entute 97 klasoj de baz- kaj mez-lernejoj el preskaŭ 30 landoj de ĉiuj kontinentoj. La oficiala starto de la projekto estis en septembro 1999 kun plano ke ĝi realiĝu dum du studjaroj. Dum la studjaro 1999/2000, krom laŭprojekte planitaj aktivajoj, okazis kelkaj renkontiĝoj de partoprenantoj (Pale, Ĉaĉak, Krakovo k.a.) kaj internaciaj seminarioj de Interkulturo (Kopaonik, Ĉaĉak). Aŭtune 2000 estis difinitaj temringoj - grupoj de klasoj de samaj aĝgrupoj interesigantaj pri samaj esplortemoj kaj komenciĝis efektiva interŝanĝo inter la klasoj kiu plu daŭras. Aparte menciindas la subprojektoj de Interkulturo: "Eŭroludejo" kaj "Proverbejo".

Dume novaj partoprenemuloj interesiĝis pri la projekto. Aktivuloj de TEJO trovis ĝin interesa por sia medio. Sekve, Interkulturo estis prezentita en la seminario de TEJO "Lingva ĉielarko – ponto inter kulturaj trezoroj" en Budapeŝto, marto 2001, kaj konstatita kiel bona ŝanco por pli firma kunlaboro inter ILEI kaj TEJO. Rezultoj de la dujara aplikado de la projekto estis resumitaj en la Tago de la Lernejo en UK en Zagreb kaj dum la 35-a konferenco de ILEI en Lovran, Kroatio, 2001/07.29-08.04. La dumkonferenca seminario pri Interkulturo pritraktis la dujarajn spertojn, perspektivojn de ĝia daŭrigo kaj dezireblajn novajn enhavojn, agadmetodojn kaj partoprenantojn. La Komitato de ILEI decidis daŭrigi la projekton komisiante al la Estraro fari konkretan planon. Post la konferenco plivastiĝis populareco de Interkulturo, aparte en Rusio, kie ĝi estis prezentita en la 41-a OKSEJT, aŭgusto 2001, kaj kie oni planas vastan aplikadon de la projekto. Novaj aliĝanonoj venas el Britujo, Francujo, Bulgarujo kaj aliaj landoj. Por plenumi tiujn dezirojn bezonatas novaj homfortoj kaj estas necese replani la projekton kaj aktualigi la TTT-ejon.

5. KONKLUDE: KION PLU

La plurmonata traktado de ebla kunlaboro pri Interkulturo inter ILEI kaj TEJO, kaj ankaŭ UEA, gajnas per la TEJO-seminario "Esperanto@Interreto" ŝancon fari la kunlaboron efektiva. Teamo de junaj fakuloj pri la reta teknologio povas solvi urĝajn necesojn por plene (re)funkciigi la Virtualan lernejon "Tibor Sekelj" precipe el la vidpunkto de aliĝado de novaj klasoj kaj ebligo, ke ili efektive uzu servojn de la retejo. Pli longdaŭre la teamo povos, interkonsente kun projektogvidanto, rekonstrui la paĝaron de "Tibor Sekelj" donante al ĝi pli modernan aspekton kaj teknologian strukturon por ebligi plenan plenumadon de la funkcioj kiujn ĝi havas kaj kiujn ĝi nove havos. Krome, estas necesaj novaj kunlaborantoj por diversaj roloj en la projekto, ekzemple regionaj kunordigantoj aŭ kunordigantoj de esplor-grupoj kaj subprojektoj de Interkulturo. Laborgrupa traktado dum kaj post la seminario proponu por tiuj demandoj solvojn realigeblajn kun aprobo de la Estraro de ILEI akorde kun la interkonsentita kunlaboro de la du organizoj sur la kampo de Esperanto-instruado kaj aplikado.



Mihai Trifoi el Bixad (RO) kun siaj Interkulturanoj dum IIK 2001

POSTPRELEGAJ / LABORGRUPAJ NOTOJ

En la postprelega diskuto oni starigis demandojn pri praktikaj aspektoj de realigado kaj rezultoj de la projekto kaj rimarkis plibonigendaĵojn en ĝiaj retpaĝoj (supersignoj, pli facila alirebleco al paĝoj de klasoj, neceso de pli efektiva kaj pli komforta uzeblo por lernantoj, navigilo, paĝarmapo ks).

Ekfunkciis la laborgrupo pri Interkulturo kiu dumseminarie pristudis la projekton pli detale kaj daŭrigos kontaktadon post la seminario. Ĉiuj aliĝos al la diskutgrupo sekelj@yahoo.com en kiu jam partoprenas instruistoj kaj aliaj agantoj de la projekto. Sian pretecon por longdaŭre partopreni en ĉi tiu projekto esprimis ankaŭ aliaj TEJO-aktivuloj kaj TTT-fakuloj, kiuj iom post iom aliĝados al la projekto depende de finiĝo de iliaj aliaj aktualaj taskoj.

Konkludoj de la laborgrupa diskuto:

1. Per kelkaj rapide fareblaj ŝanĝoj kaj aldonajoj eblas fari la paĝaron pli uzebla por la lernantoj kaj aliaj vizitantoj:
 - 1.1. Sur ĉiu paĝo aldoni navigilon kun ligiloj al: ĉefpaĝo (fasado), distribulisto sekelj@yahoo.com klasartabelo kaj (se ekzistus) klasarmapo;
 - 1.2. Uzebligi programojn kiuj ebligas, ke lernantoj mem povu redakti parton de siaj paĝoj kaj tiel senti sin aktivaj partoprenantoj tuj vidantaj rezulton de sia laboro;
 - 1.3. Tuj kontaktiĝi kun la projektogvidanto Mauro La Torre por interkonsenti pri kiel realigi tiujn ŝanĝojn.
2. Pli longdaŭre, estas necese ĝenerale rekonstrui la paĝaron por, interalie:
 - 2.1. Regule aperigadi novaĵojn (lastajn ŝanĝojn) ĉe la paĝoj: sur la ĉefpaĝo por la tuta paĝaro kaj sur ĉiu paĝo por la koncerna parto;
 - 2.2. Ebligi traserĉadon per retserĉilo (bezonas datumbazo) kaj
 - 2.3. Ebligi laŭtemajn diskutgrupojn / babilejojn
3. Estas necese ke regule, almenaŭ monate, aparadu retbulteno (ekz. "Interkulturo-aktuale").

4. Estas rekomendinde ebligi uzadon ankaŭ al plenkreskaj komencantoj per aparta paĝo / diskutejo.

5. La laborgrupo daŭrigos la kunlaboron pere de la distribulisto sekelj@yahoo.com kaj interkonsente kun la projektogvidanto. Se montriĝos necese, kreiĝos aparta distribulisto.

Ilona Koutny

Universitata instruado kaj instruista trejnado*

Instruado de esperanto havas gravan rolon por la pluvivo de la lingvo kaj por ĝia uzo en adekvata nivelo, tamen ĝi preskaŭ ne aperas en oficialaj lernejoj. Ekzistas streboj enkonduki ĝin en diversajn nivelojn de la instrusistemoj. La motivoj kaj celoj diversas de propedeŭtika valoro (ĉefe en elementa lernejo) tra helpado en interkultura komunikado (en ĉiuj niveloj) ĝis lingvistika modeligo (en universitatoj). Ni analizos la universitatan instruadon de e-o kaj ĝian rilaton kun instruista trejnado surbaze de plurjaraj spertoj en hungara kaj pola universitatoj. Ni diskutos la neceson kaj enhavon de universitata agado.

1. Esperanto kaj esperantologio en la supera instruado

Por prezenti la altlernejan kaj universitatan instruadon de e-o kaj esperantologio ni uzos tri kriteriojn, kiuj plurflanke interplektiĝas.

Laŭ **statuso** ni povas paroli pri:

- studrondo, okazanta en universitato, sed **ekster la stud-programoj** aŭ liberaj prelegoj, kiuj ne kalkuliĝas en la rezultoj de la gestudentoj;
- **oficiala kurso** kun poentoj, kreditoj aŭ iuspeca enkalkulado en la rezultoj de gestudentoj;
- **memstara studprogramo** kun diplomo en iu organiza kadro.

Laŭ **tipo** temas pri:

- **lingvokursoj** en baza aŭ meza niveloj, tre malofte en supera nivelo. Tiu ĉi estas ne vere universitatnivelaĵoj, sed

* Surbaze de prelego prezentita dum la 35a ILEI-konferenco, Lovran, 2001

lingvokursoj similaj al tiuj en mezlernejoj aŭ por plenkreskuloj en iu klubo;

- **sciencaj prelegoj aŭ kursoj** pri esperantologio kaj interlingvistiko, kiuj prezentas internacian komunikadon aŭ lingvopolitikon, artefaritajn lingvojn kaj nur bazajn trajtojn de kaj informojn pri esperanto en naciaj lingvoj (vd. la programon de Blanke (2000) en Berlino);
- **faka kurso en e-o**, kiel kutime AIS faras dum siaj universitataj sesioj;
- **kompleksa studprogramo**, simila al filologio de diversaj lingvoj, startante de nulo aŭ de iu baza scio de la lingvo, ofertante prelegojn pri e-aj lingvistiko, literaturo kaj kulturo, eventuale pri metodiko.

La celoj varias inter:

- **informi** pri esperanto, pri la lingvo, movado, pri ĝia ebla rolo en la internacia komunikado, tiel elformi pozitivan aliron al ĝi ĉe homoj, kiuj eventuale estos “intelektaj aktivuloj” (vd. Blanke), aŭ eĉ en decida rolo (ĉefe dum sciencaj kursoj);
- **baki esperantistojn** (ĉefe dum e-kursoj);
- **formi profesiulojn** pri esperantologio (celo de memstara kaj kompleksa studprogramo).

Tamen estas malfacile prezenti la mapon de universitata instruado laŭ tiuj kriterioj, ĉar mankas fidindaj kaj detalaj informoj pri la supera instruado de esperanto. Danke al la senlaca laboro de G. Pirlot aperis regule kajeroj pri universitata instruado ĉefe en la 80-aj jaroj. Nuntempe evidentas la reta registrado de tiuj kursoj, kaj tio efektive okazas danke al Maŭro La Torre (vd. <http://lps.uniroma3.it/eler>), sed ne estas ĝisdata (Blanke (2000) mencias 9 germanajn universitatojn, kie okazas de tempo al tempo lingvokursoj aŭ sciencaj kursoj kaj la reta fonto 18, verŝajne kelkaj ĉesis funkcii).

La listo de superaj institutoj, kiuj proponas e-kursojn estas sufiĉe impona (laŭ la reta fonto 143), se kredi al ĝi. Estas malfacile doni precizan bildon pri la diversaj lingvaj kaj sciencaj kursoj, ĉar ili ne funkcias konstante, multe dependas de la pozicio de la instruanto, krome mankas informoj pri la oficialeco, ktp. Sen tio ni povas mencii nur kelkajn ekzemplojn. Esperantologiaj kaj interlingvistikaj kursoj okazadas en pluraj eŭropaj universitatoj: en Berlino, Frankfurto, Hamburg, Leipzig, Rostock,

Paderborn (Germanio laŭ Blanke 2000), Amsterdam (Nederlando), Torino, Romo (Italio), Stockholm (Svedio), Szombathely (Hungario). Lingvokursoj okazadas en Moskvo (Rusio), Krakovo, Lublin, Poznań, Torun (Pollando), Sárospatak, Debrecen, Szombathely (Hungario). Plej ofte lingvokursoj daŭras 1-2 semestrojn kaj havas po 2 horojn semajne. Enkadre de tio malmulte eniras krom la lingvo mem. Oni devas disponi pri almenaŭ 4 horoj semajne dum 4 semestroj por ke kurso pri literaturo, movado aŭ metodiko povu okazi (ekz. en Krakovo).

Memstara studprogramo, kiu en si mem bezonas plurajn jarojn, kaj kutime iun oficialan kadron, funkcias pli stabile. La Esperanto-fako de la Budapeŝta Eötvös Universitato ekzistas jam ekde 1966, la internacia varianto ekde la fino de la 80-aj jaroj, kvankam la lasta stagnas. Bedaŭrinde, la studoj ricevos altlernejan rangon ekde la sekva studjaro. En Poznań fondiĝis internacia Interlingvistika fako en 1997. Ankaŭ universitataj lingvaj aŭ sciencaj kursoj havas pli ofte oficialan kadron ol lingvokursoj en baz- kaj mezlernejoj, kie la nuraj studrondoj pli oftas. La projekto Interkulturo donas novan elanon al la bazlerneja instruado en oficialaj kadroj. La oficialeco donas pli da prestiĝo al la kurso, tiel pli da partoprenantoj.

Ne nur la instruado de e-o, sed ankaŭ la akcepto de e-ekzamenoj kontribuas al la pli forta pozicio de la lingvo. En hungaraj universitatoj, nur tiam studento povas akiri sian diplomon nuntempe, se li/ŝi havas ekzamenon pri du fremdaj lingvoj (unu mezgradan kaj unu bazgradan). Pluraj universitatoj kaj altlernejoj akceptas la ŝtatan lingvoekzamenon pri esperanto por tiu celo. Tio kontribuas al tio, ke dum la lastaj jaroj inter 1000-2000 homoj trapasas la ŝtatan lingvoekzamenon pri e-o.

2. Instruista trejnado kaj supera instruado

Por bona instruado necesas bona instruisto. Ĉu iu naskiĝas por esti instruisto aŭ per trejnado estiĝas tio? Por povi respondi al tiu ĉi demando, ni vidu, **kion bezonas bona esperanto-instruisto!**

- **superagradan lingvoscion;**
- **metodikajn konojn pri lingvoinstruado;**
- **vastajn kulturajn konojn pri e-aj literaturo, movado, teatro, kantoj, ktp.;**
- **bazajn nociojn de ĝenerala lingvistiko kaj interkultura komunikado.**

Kompreneble gravas, ke iu havu denature iujn trajtojn, kiuj ebligas, ke li aŭ ŝi estu bona pedagogo, instruisto: ekzemple paciencon, kapablon klarigi, komprenigi aferojn, kunordigi la agadon de pluraj homoj kaj nepre entuziasmon por tio, kion li instruas. Sed la aliajn menciitajn konojn oni devas alproprigi.

En Esperantio ofte okazas, ke iu finis bazan kurson aŭ memlerne atingis iun bazan nivelon kaj tuj komencas instrui, ja „esperanto estas facila lingvo” kaj entuziasmo feliĉe ne mankas. Tiel li aŭ ŝi transigas siajn erarojn prononcajn, gramatikajn (ekz. lia/sia, participoj) aŭ leksikajn (eventuala uzo de naciismoj). Eblas komuniki per malmultaj vortoj kaj gramatikaj eraroj, tamen instruisto devus havi multe pli vastan vortprovizon kaj ĝustan lingvouzon!

Iu povas havi bonajn ideojn por instruado, eĉ devas havi siajn proprajn por esti originala kaj aŭtentika instruisto, tamen indas ĉerpi el la sperto de aliaj instruistoj kaj de la metodologio de aliaj lingvoj. Tio ŝparas tempon kaj erarojn, kies suferantoj estas la gelernantoj. Aliĝante al e-kurso lernantoj ne celas kutime konkretan profiton (kiel aplikon en la (estonta) laborloko), ili restos ĝis la fino, se ĝi estas interesa, alloga, do ĝi devas esti eĉ pli bona ol la kurso pri la angla. Tion oni malofte povas atingi per eksmodaj metodoj!

Se temas pri instruado, ŝtelado estas permesita, eĉ bonvenigata. Instruisto ekuzu la bonajn ideojn, metodojn, kiujn li/ŝi renkontis ie ajn, ĉar la gelernantoj gajnas per tio. Metodiko disponigas ilaron, el kiu la instruisto povas elekti laŭ bezono (laŭ celgrupo, instruata materialo, evoluigata kapablo).

Kvankam e-o estas interesa lingvo pro sia trvidebla strukturo, sufiĉe regula kaj produktiva derivsistemo, tamen utilas doni ĉiuspecajn informojn al la studemuloj por kontentigi iliajn aliajn interesojn (de historio ĝis rokmuziko).

Ofte ni renkontas la vidpunkton, ke e-o estas tute alia ol la etnaj lingvoj, ni ne traktu ĝin en similaj kadroj. Tio estas ne konvena aliro, kvazaŭ ni mem forprenus e-on el la kategorio de lingvoj! Esperanto funkcias, kiel la aliaj lingvoj, ni devas analizi ĝin laŭ samaj kriterioj kaj surbaze de ili montri, en kio e-o similas kaj en kio malsamas al (certaj) etnaj lingvoj, kiujn specifaj ĝi havas. Almenaŭ instruisto devas koni la bazajn nociojn de lingvistiko kaj la lingvistikajn aspektojn de e-o por povi dialogi kun lingvisto.

La ĉefa rolo de esperanto realiĝas en interkultura komunikado. Konoj en ĉi tiu tereno estas same utilaj, por pretigi la gelernantojn por la renkontiĝo kun alikulturanoj kaj por povi enmeti esperanton en konvenan kadron (ekz. en la kazo de la projekto Interkulturo).

Se iu volas iĝi instruisto de la angla aŭ germana, devas studi kaj diplomigi. Ĉu por esperanto sufiĉas memlernado kaj ne necesas diplomo? La mankon de profesieco en Esperantio ankaŭ aliaj kritikis (vd. Smidéliusz 1997). Kompreneble oni povas mem lerni multe, kaj iu diplomo en si mem ne garantias la altan nivelon de ĉiuj necesaj konoj kaj kapabloj. Tamen la studoj por akiri diplomon igas la kandidaton okupiĝi pri diversaj kampoj, kiujn oni parte ellasus sen iu planita programo kaj ekzamendevigo.

Ni menciis la kompatindan statuson de e-o instruado en lernejoj. Kiel ni volas havi la saman statuson, se niaj instruistoj ne havas diplomon? Se la streboj por enkonduki e-on en la Eŭropan Union, kaj tiel en la eŭropan lernejan sistemon atingus sian celon – eĉ se nur por iu provperiodo nur en kelkaj landoj aŭ institucioj –, kie estus la rajtigataj instruistoj, tradukistoj, kaj aliaj alte kvalifikitaj profesiuloj por tion plenumi?

ILEI povas organizi unusemajnan instruistan trejnadon kaj ekzamenon por instrukapablo, kvankam la ĝisnuna agado montras ĝian malfortecon. IEI koncentriĝas pri la tradicia Cseh-metodo. La profesion formadon por akiri la supre menciitajn konojn certigas kutime altlernejaj kaj universitataj fakoj kun plurjara programo, samtempe universitata diplomo havas sian prestiĝon.

3. Spertoj en ELTE kaj UAM

3.1. La hungara **Eötvös Loránd Universitato (ELTE)** en Budapeŝto havas la plej longan tradicion de **Esperanto-fako**. Ekde sia fondiĝo en 1966, ĝi proponas kompleksan instruprogramon por la gestudentoj de la universitato, kiu krom la 3-jara lingvokurso entenas kursojn pri e-gramatiko, literaturo, kulturo, movadhistorio, interlingvistiko. Povas aldoniĝi metodiko kun instrupraktiko kaj aliaj studobjektoj. La studoj startas de la nulo kaj finiĝas per universitata diplomo. La tuta studado daŭras nuntempe 4 jarojn (apud iu ĉefa fakoj).

Dum la okdekaj jaroj okazis enlandaj korespondaj postdiplomaj studoj 3-jaraj por e-istaj instruistoj (praktike ĉiumonate okazis renkontiĝo surloka). La programo ebligis pli detalan traktadon de diversaj terenoj de e-kulturo kaj lingvistiko, ĉar la partoprenantoj jam havis bazajn konojn. Tiuj

kolegoj povis poste labori en elementaj aŭ mezlernejoj, kie e-o estis oficiale aŭ en studrondo instruata. Pro la transformoj en la universitata instrusistemo, tiu ĉi studformo estis ĉesigita.

Fine de la 80-aj jaroj estis lanĉitaj la internaciaj korespondaj postdiplomaj studoj 3-jaraj por e-istoj (praktike ĉiusemestre unufoje okazis renkontiĝo surloka). Ĝia programo estis simila al la enlandaj postdiplomaj studoj kaj post la sukcesa finekzameno kaj defendo de diplomlaboraĵo la finstudintoj akiris magistran diplomon. Du grupetoj diplomigis. Tiuj ĉi studoj nun stagnas pro manko de gestudentoj.

Prof. Szerdahelyi multe kontribuis al la elformiĝo kaj evoluigo de la E-fako (ekz. verko de lernolibroj) ĝis sia morto en 1987. Mi mem – diplomito de la fako – dum jardeko (1986-1995) prizorgis la esperantologiajn studojn, instruante la lingvon en 3 ŝtupoj kaj lingvistikon. Regule kontribuis eksteraj lekciiistoj, kiel la karmemora Zsuzsa Barsay pri metodiko, Árpád Rátkai pri movadhistorio, d-ro Balázs Wacha pri lingvistiko. Nuntempe tri personoj instruas en la fako: d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits (kunlaborantino ekde 25 jaroj, nun gvidanto de la E-fako) kaj Iván Bujdosó plentempe kaj d-ro Árpád Máthé.

Naskiĝis pli ol 150 diplomlaboraĵoj kaj kelkaj doktoraj disertajoj. Parto de la diplomitoj serioze agadas en esperantologia kampo.

3.2. La eksteraj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato de Adam Mickiewicz (UAM en Poznań, Pollando, kie mi nun laboras por la Hungara fako) startis la unuan fojon en la studjaro 1998/99 kaj ĉi-jare okazos la diplomiga, lasta jaro (surloka intensa semajna sesio okazas unufoje dum la semestro). La 3-jara internacia studumo konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi ankaŭ pri metodiko.

Inter la prelegantoj estas konataj esperantologoj, kiel profesoroj Detlev Blanke, Humphrey Tonkin kaj John Wells, d-roj Vera Barandovska-Frank, Zbigniew Galor, Katalin Smidéliusz kaj Blazio Wacha, same Lidia Ligeza kaj István Ertl.

Por la gestudentoj de la Lingvistika Instituto (enkadre de kiu funkcias la Interlingvistikaj Studoj) mi anoncas de tempo al tempo e-kurson, kiun lastatempe mi realigis kun kolego Bradío Maŭro.

4. Universitata agado

El la ĝis nun diritaj sekvus, ke la supera instruado de e-o estus nia evidenta strebo pro internaj kaj eksteraj bezonoj (por plialtigi la fakan nivelon kaj por prezentiĝi dece ekstere). La aktualecon kaj urĝajn taskojn de universitata agado ankaŭ ILEI rekonas (vd. la novjaran enkondukon de la prezidanto Maŭro La Torre en IPR 2001/1). Kvankam ekzistas malmultaj universitatoj, kiuj ofertas kompleksan studprogramon por esperanto kun diplomo, eĉ tiuj **ne** estas eluzataj!! ... Kaj ĉi tie la alcelita grupo estas esperantistoj!

Ĉu Esperantio entute bezonas superan instruadon, profesiecon, aŭ kontentiĝas per porokazaj kursoj por komencantoj kaj per hobiismo? Ŝajne, esperantistoj batalas por ke la neesperantistoj rekonu la rolon de esperanto, ke ili enkonduku e-on en la lernejan sistemon, sed ili ne tro emas mem persiste labori pri la pliperfektigo, ja tion ili devas fari por sia civila profesio. Kompreneble, ankaŭ la financa flanko kontribuas al la problemo kaze de instruistaj studoj, kaj la manko de reala posteno per la akirita diplomo (la EU-apliko nur ŝvebas, kontribui al la projekto Interkulturo estus pri reala, sed oni devas fortostreĉi por ĝi!).

Se ni superas la antaŭan pesimisman aliron, tiam ni povas koncentriĝi al la demando, **kiel enkonduki esperanton en universitatojn**. La tasko estas multe pli reala, se tio okazas *de interne*, do iu e-isto – okupiĝanta pri filologio, pedagogio aŭ psikologio – jam havas postenon en la universitato, kaj povas proponi kurson pri esperanto aŭ esperantologio. Estas multaj kolegoj, kiuj ne eluzas tiun eblecon! *De ekstere* proponita kurso bezonas internan subtenon por ke ĝi estus stabila, ne nur laŭokaze tolerata, senpaga kurso.

Estas konsilinde trovi ligojn al ekzistantaj studprogramoj (ekzemple en la budapeŝta Eötvös Universitato, E-fako funkcias kadre de la Lingvistika Katedro kaj ofertas kurson pri interlingvistiko ankaŭ por ĝiaj gestudentoj). Nuntempe la tereno de interkultura komunikado estas populara. Ni devas trovi lokon por e-o en ĝi. Tiel ĝi nature enkalkuliĝos en la studoj. Estas pli reala kurso pri interlingvistiko aŭ interkultura komunikado, kiu traktas ankaŭ e-on. Ĝin povas sekvi lingvokurso por interesigantoj. Laŭ miaj ĝisnunaj spertoj, ne necesas multaj memstaraj kompleksaj programoj pri esperantologio, ĉar Esperantujo ne havas bezonon por tio.

Neglektata problemo, sed reala estas la **konservo de la jam ekzistantaj esperantologiaj studoj**. Ili, kiel la plej altaj instruinstancoj meritis la subtenon flanke de e-movado per informado pri, varbado por la studoj kaj per stipendioj por kelkaj partoprenantoj. La edukado devas esti kaj estas *“investo por ĉiu”* – emfazas ankaŭ Stefan MacGill (2001).

Necesas difini ankaŭ la rilaton inter tiuj instruinstancoj kaj ILEI. Universitata esperantologia fako kun kompleksa programo kaj diplomo (kiel en UAM) povus plenumi la rolon por formi kvalifikitajn instruistojn por ILEI kaj tiel por la e-movado, kunlaboranta kun ĝi. La landaj sekcioj de ILEI aŭ la landaj asocioj mem, eĉ TEJO povus delegi partoprenanton por la studoj kun ia subteno.

Estus dezirinde **harmonigi la metodikan programon** de la universitataj fakoj kaj de instruistaj seminarioj de ILEI. Tiel ILEI povus organizi instruistajn seminariojn kun simila programo kiel la universitata, parte kun samaj instruistoj, en diversaj landoj por tiuj, kiuj ne povas veturi al eksterlandaj studoj, aŭ kontentiĝas per metodika trejnado sen kompleksa formado. Aliflanke oni povus pensi pri la akcepto de tiuj seminarioj enkadre de la universitataj studoj. En ambaŭ kazoj oni povus fari instruajntigan ekzamenon fine.

Koncerne ĉiusepcan superan instruadon de esperanto aŭ esperantologio, necesus **reciproka informado kaj kunlaboro.**, t.e.:

- la kolegoj instruantaj e-on aŭ esperantologion, interlingvistikon devus sendi informojn pri la kurso kun programo al la centra TTT-ejo (vd. supre) kaj same enmeti tiujn informojn en la TTT-efojn de sia universitato;
- estus bone organizi kontaktojn inter la gestudentoj, inkluzive interŝanĝojn;
- necesus trovi kadrojn por scienca kunlaboro (en la tereno de metodiko, interkultura komunikado, lingvopolitiko, dulingvismo, ktp.) inter si kaj ankaŭ kun neesperantistaj esploristoj petante subtenon de fondadoj.

ILEI elektis respondeculon pri universitata agado en la persono de Radojica Petrović, kiu jam dissendis sian unuan informilon-enketilon. Ankaŭ la Komitato de UEA post traktado de la temo (en la kunsido dum UK en Zagrebo) komisiis Amri Wandel por prizorgi la rilatojn kun la

Internacia Asocio de Universitatoj kaj rekomendis al UEA disponigi rimedojn por instruceloj. Tamen io moviĝas.

*D-ino Ilona Koutny, akademiano,
gvidanto de Interlingvistikaj Studoj, UAM, Poznań, Pollando*

Bibliografio

Blanke, Detlev (2000): Esperanto en germanaj universitatoj. En: IPR 2000/3

La Torre, Maŭro (2001): Novjara enkonduko. En: IPR 2001/1

MacGill, Stefan (2001): De kie niaj laborfortoj? En: 2001/2

Smidéliusz, Katalin (1997): Projekto Klera – profesia formado de E-kursistoj.

En: IPR 1997/1

Konatiga Esperanta kurso "Faru la rondon!"

(FaRo)

Jen estas la bazaj punktoj de la koncerna *prelego, farita dum la 35-a ILEI-Konferenco en Lovran*. Mi komencis praktiki la kurson printempe 2000 kaj okazigis 4 tiujn, kio donis sufiĉan sperton por la konkludoj kaj permesis transdoni gvidadon de la kurso al la plej instrukapablaj ĝiaj partoprenintoj.

Celo. Interna celo de FaRo estas riĉigi la E-movadon per freŝaj homfortoj. Ekstera celo (anoncata al la lernontoj) estas: minimuma (kaze de nura vizitado) – konatiĝo kun Esperanto dum vigla tempopasigo en amika etoso, maksimuma (kaze de regula vizitado kaj paralela serioza memlernado) – ekposedo de E-gramatiko, akiro de elementa komprenkaj parolkapablo en Esperanto.

Celgrupo. Ĉefe – studentoj kaj gejunuloj, inkluzive pli malnovajn lernejanojn. Plus la plej interesitaj kaj kapablaj mezlernejanoj kaj kelkaj aĝuloj. La grupo ne devas esti pli ol 12- kaj malpli ol 8-homa.

Aligo. La lernontoj pagas por la tuta kurso kaj la lerniloj 400 rbl (sufiĉe granda mono por gejunuloj kaj relative malgranda mono kompare kun kostoj de fremdlingvaj kursoj) kaj plenigas aliĝilon, kiu per si mem estas inter cetere plia varbilo, reklamo, garantiigilo ktp. – do, elvokas multajn demandojn pri la E-movado kaj forte varmigas la intereson. Krome ili

ricevas la programon de la tuta kurso kun datoj kaj temoj de ĉiuj lecionoj kaj kromaj tiutempaj E-eventoj (klubkunvenoj, aranĝoj, regionaj aŭ landaj renkontiĝoj) kun adresoj, detala priskribo kiel trovi la lokojn kaj kontakttelefonoj.

Lerniloj. Ĉe la aliĝo la lernantoj ricevas ĉion, kion ili bezonas se dum la kurso aperas deziro memstare profundigi en la materialon: kelkpaĝan konsultlibreton de Andrej Grigorjevskij; solidan akademian eldonon "Lernolibro de Esperanto. Baza kurso" de Boris Kolker; la ruslingvan libron de N. Gudskov "Faktoj kaj kurtaj informoj pri Esperanto"; "Kontakto-Vortaron" (la vortlisto de la ĵurnalo "Kontakto", kiu estas konsiderata kiel nepra minimumo por havi rajton partopreni rusiajn E-aranĝojn); Esperantan-Rusan Teman vortaron de Igor Galiĉskij; 2 poŝajn kantaretojn – kun la plej popularaj en Rusio E-kantoj kaj kun dulingvaj kantoj; legolibron de Claud Piron "Gerda malaperis". Dum la kurso en ĉiu leciono la lernantoj ricevas folion kun la tuta teksto de la leciono kun ekzercoj kaj hejmaj taskoj.

Instruiloj. Grandformataj nomŝildoj, ŝildoj por meblaro kaj ĉio troviĝanta en la klasĉambro, paperfolioj (A4) kun frazoj kaj gramatikajoj, ne malpli ol 100 grandformataj bildoj (revuaj eltranĉaĵoj) kaj sennombraj slip-bildetoj, slipetoj kun vortoj, deko da diverskoloraj molaj ludiloj malgrandaj ("karesbestoj") kaj alispecaj ludiletoj, magnetofono kun sonkasetoj, disdonota tajpmaterialo kun la tekstoj de kantoj kaj versaĵoj, laboraj lecionaj folioj-elprintaĵoj, koloraj feldkrajonoj, papero por desegni ktp.

Programo. La kurso konsistas el 10 lecionoj po 2,5 horoj, Lingva Olimpiko kiel kontrolo de la rezultoj kaj Gasta Vespero (vd. plie). Foje antaŭ la kurso estas okazigata speciala Aliĝkunveno. Do, sume 12-13 kunvenoj.

La kurso estas rektmetoda (la Gvidanto NENIAM parolas ruse!), enhavas ĉiujn bazajn gramatikaĵojn de Esperanto, de la alfabeto ĝis kompleksaj tempoj. Ĉiu leciono estas dediĉita al konkreta temo, plej triviala (konatiĝo, ŝatokupoj, vendejo, urbo ktp). Enestas lingvaj ludoj (ankaŭ movaj), kantado, para laboro, korusaj respondoj ktp.

Gvidanto devas regi la lingvon, kompetenti pri metodiko de E-instruado, ami la laboron kaj la gelernantojn, esti bonkora, tolerema, amikema kaj adaptiĝema al foje surprize ŝanĝiĝanta situacio. Necesas tre bone prepari la lecionojn teknike kaj enhave. La Gvidanto devas krei la amikan kaj samtempe dinamike-laboran etoson de la kurso kaj sincere ĝui tiun kune kun la kursanoj.

Teamo. La Gvidanto laboras helpata de la Teamo. La teamanoj parolas inter si nur Esperante. La Teamo baze konsistas el la lernintoj de la antaŭa FaRo (kaj tio estas bona ripetado por ili), sed estas malfermita ankaŭ al senescepte ĉiuj sukcesfinintoj de antaŭaj FaRoj kaj ĉiuj parolantaj esperantistoj. Speciale bonvenas gvidantoj de junulara E-movado kaj junaj E-aktivuloj. Tio helpas tuj kunigi la kursanojn kun la movadanoj, kaj post la kurso la lernintoj, konante la esperantistojn dum kursaj kunagadoj, jam ne sentos sin fremdaj.

Taskoj de la teamanoj. La teamanoj: preparas la klasĉambron kaj teknikajojn antaŭ la lecionoj; respondas demandojn kaj kontrolas gramatikajn ekzercojn de la kursanoj antaŭ la lecionoj; laboras kiel imitmodeloj por la kursanoj kaj kiel kursanoj (ĉe, ekzemple, korusaj respondoj) por kuraĝigi ilin; dum grupa enronda laboro sufloras korektan respondon al postrestuloj; gvidas laboron pri gramatikaj kaj paroligaj ekzercoj en etaj grupoj aŭ para agado (kutime – kiom da teamanoj, tiom da et-grupoj); ordigas la klasĉambron post la lecionoj.

Akcepto de novaj kursanoj. La novuloj estas akceptataj al la kurso ĝis la 5a leciono inkluzive. Tion ebligas aktivado de la teamanoj, kiuj: ekster la lecionoj helpas al la novuloj studi la jam lernitan materialon; rajtas flustre ruse suflori kaj devas ajne helpi al ili dum la lecionoj.

Ejoj. Ideale la ejoj devas esti du: la klasĉambro kaj la vestiblo. **En la vestiblo** la kursanoj kunvenas, babilas ruse kun teamanoj kaj la Gvidanto, individue laboras kun teamanoj pri hejmaj taskoj aŭ kromaj volontulaj gramatikaj ekzercoj, demandas pri E-aranĝoj kaj planas kunveturadojn, rigardas senĉesajn fotojn ktp., kuntrinkas teon post la lecionoj. **En la klasĉambro** okazas nur la leciono mem; ĉi tie oni ne rajtas paroli nacilingve (escepte flustradon de teamanoj por malstumbliĝi postrestulojn). Antaŭ la lecionoj en la klasĉambron rajtas eniri nur la teamanoj – por prepari la ejon kaj renkonti la kursanojn dum la Enira Rito. En la klasĉambro devas esti granda libera meza spaco kaj moveblaj seĝoj por ĉiu kursartoprenanto; cetera meblaro ne gravas kaj povas tute foresti.

Ritoj. La plej striktaj estas tri: la Enira Rito, La Malstreĉiga Rito kaj la Adiaŭa Rito. **La Enira Rito** celas transŝalti la partoprenantojn de eksteraj aferoj kaj zorgoj al la labora kaj amika etoso de la kurso. Inter ceteraĵoj de tiu ĉi rito estas la salutfrazo al ĉiu eniranta: "Bonvenon! Faru la rondon!" – kiu donis la nomon al la kurso. Ĝi disciplinigas kaj samtempe mildigas la homojn, kunigante ilin en unu amika rondo. **La Malstreĉiga**

Rito celas ripozigi la kursanojn post laboro de la unua lecionduono. Ĉiuj sidas en liberaj pozoj kun fermitaj okuloj kaj aŭskultas trankviligan kanton en Esperanto. **La Adiaŭa Rito** celas fari belan amikan finon de la leciono kaj kutimigi la novulojn al la tradicia adiaĵo de ĉiuj rusiaj E-aranĝoj: "Per Esperanto - por mondpaco kaj amikeco! Ĝis revido, ĝis revido, ĝis revido!"

Lokigo. Fakte, estas parto de la Enira Rito. Lokigo celas koncentrigi la partoprenantojn je "nun kaj ĉi tie" – kaj lernigi al ili nomojn de la ĉirkaŭaj objektoj kaj farataj movoj.

Kursaj nomoj. En la unua leciono ĉiu kursano ricevas la kursan nomon kaj la plenan legendon pri ĝi, lokiĝantan sur grandformata surkola ŝildo, nepre deviga por porti tra la tuta kurso. Ĉiuj kursaj nomoj estas signifaj, lernigas novajn radikojn kaj foje gramatikerojn. Ekzemple, la princino kun la nomo Rajta Regi loĝas en Singapuro, en la vilao Sange Pura. La kapitano de la ŝipo "Venkanta Maron" nomiĝas NeEmo Ordoni, li estas portugalo. Signifojn de la nomoj la kursanoj ekscias ofte jam post kiam la nomoj estas bone parkerigitaj kiel simpla belsonaĵo. Pri la kursaj nomoj kaj la legendoj laboro daŭras dum la tuta kurso. Hazarde vizitantaj esperantistoj ĉiam ricevas ŝildon kun la nomo *Transmara Gasto* kaj pliajn sufloraĵojn por fantazii sian legendon.

Metodo. Rekta - kaj malfacile priskribebla. Estas kompilaĵo el diversaj paroligaj ekspres-metodoj, psikotrejnadoj (Cseh, Lozanov, Kitajgorodskaja, Blinov, Grigorjevskije), abunda propra sperto kaj spontana fantazio.

Lingva Olimpiko okazas fine de ĉiu kurso kaj celas kuraĝigi la kursfinintojn, montrante al ili, kiom multe ili jam scias. Estas lingvokontrolo de vortprovizo (skriba), tradukkapablo (skriba), "retoriko" (unuminuta elpaŝo pri amuza temo) kaj deklamado (anticipe parkerigita versaĵo). La gajnintoj ricevas librajn premiojn.

Varbado. Fina ŝtupo – la festa *Gasta vespero*. La kurspartoprenintoj invitas siajn geamikojn, gepatrojn, ĉiujn interesitojn por kune festeni kaj demonstri, kiel gaje kaj fruktodone ni pasigas la tempon. En la komenco de la vespero ĉiuj prezentas al la aliaj siajn gastojn kaj sin mem – al alies gastoj. Estas demonstrataj kelkaj plej amuzaj fragmentoj de la lecionoj (ekz., fabelscenigo, kun engaĝigo de la publiko), la kursaj kantoj kaj plej sukcesaj olimpikaj deklamaĵoj. Fine necesas ne forgesi anonci la komencon de la sekva kurso kaj inviti al la Aliĝvespero. Teumado kutime ne tre sukcesas, ĉar mankas tempo kaj la homoj estas tro emociigitaj por

atenti regalajojn. Post tia Gasta Vespero ne estas problemoj plenigi la sekvan grupon per dezirantoj.

Irina Gončarova (Rusio)
mirina@online.ru

Ronald J. Glossop Pri nova epoko

prelego en la 35a ILEI-Konferenco 2001, Lovran, Kroatio

La komenco de la 21a jarcento estas nova epoko ne nur laŭ la kalendaro sed ankaŭ rilate al la vivmaniero de la homaro. Ni povas retrorigardi al nia pasinteco, sed ni devus ankaŭ antaŭenrigardi al la estonteco.

1. Historia Fono

La agrikultura revolucio, la unua granda transiro en la homa vivmaniero, okazis antaŭ almenaŭ dekoj da jarmiloj.[1]

Antaŭ tiu ŝanĝo ni homoj loĝis en malgrandaj nomadaj tribaj grupoj, kiel la ĉimpanzoj. Sed post tiu revolucio ni komencis resti en unu loko, ĉar la posedo de sufiĉa kvanto da nutraĵo signifis, ke ni ne plu devis moviĝi de loko al loko. Male, niaj prauloj tiam devis resti en unu loko, ĉar la semoj en la tero, kiuj fariĝis la grenoj en la kampoj, ne moviĝas. Iom post iom komenciĝis novaj homaj agadoj kiel kalkulado, skribado, proprietado de la grundo, starigo de urboj, kreo de formalaj registaroj, kaj milita batalado por gajni teritorion.

Antaŭ proksimume kvincent jaroj en Eŭropo la homaro komencis sperti la duan grandan transiron en nia vivmaniero, la industriar revolucio. Rerigardante, ni povas vidi, ke ĉi tiu dua granda transiro okazis ĉefe pro tio, ke oni evoluigis sciencan metodon por akiri scion pri la naturo.[2]

Nova scio kondukis al la invento de novaj instrumentoj, ekzemple teleskopoj por vidi malproksimajn objektojn en la ĉielo; fidindaj kompasoj por navigi sur la vasta maro; la presmaŝino kun movebla liter-

tiparo por presi librojn; kaj armiloj, kiuj uzas pulvon. Homoj uzis sian nove akiritan scion ankaŭ por fabriki maŝinojn, kiuj utiligas la fortojn de naturo por helpi en la homa laboro. Dum kvin jarcentoj ni kreis lokomotivojn, aŭtomobilojn, elektrajn motorojn, telefonojn, radiofonojn, aviadilojn, televidajn aparatojn, komputilojn, novajn specojn de medikamento, kaj tiel plu. La moderna erao de nia homara historio komenciĝis. La industriigado, kiu ekekestis en Eŭropo antaŭ kvin jarcentoj, iom post iom disvastiĝis al la resto de la mondo.

Pro la evoluo de industrio kaj ĝiaj novaj inventoj, dum la lastaj kvin jarcentoj la diversaj partoj de la mondo interkonatiĝis. La potencaj industriigitaj nacioj-ŝtatoj uzis sian superan povon por venki aliajn landojn kaj krei grandajn naciajn imperiojn. Naciismo iĝis tre grava motivo por militoj inter diversaj landoj. Pli malpotencaj etnaj grupoj kaj en Eŭropo kaj en aliaj mondpartoj maltrankviliĝis pri la konservado de sia nacia heredaĵo. Kelkfoje tio estigis postulon havi la propran nacio-ŝtaton. Aliffoje tiuj etnaj grupoj penis akiri almenaŭ la rajton uzi sian propran nacian lingvon, precipe en lernejoj. Efektive oni povas priskribi la 19-an jarcenton kiel la eraon de naciismo.

Tamen dum la 19-a jarcento evoluis ankaŭ nova tendenco krei internaciajn organizaĵojn, kaj registarajn kaj ne-registarajn, por trakti problemojn, kiuj transiris landlimojn. La unuaj tiaj organizaĵoj en Eŭropo estis la Komisiono pri Rejno (1815) kaj la Komisiono pri Danubo (1856). Dum la lasta parto de tiu jarcento oni kreis plurajn internaciajn organizaĵojn, kiel la ne-registaran Internacian Ruĝan Krucon (1864) kaj internaciajn registarajn organizaĵojn kiel la Internacian Telegrafan Union (1865), la Internacian Meteorologian Organizon (1873), kaj la Ĝeneralan Poŝtan Union (1874). Ĉiuj Esperantistoj konscios, ke ĝuste dum ĉi tiu periodo Doktoro Zamenhof eldonis sian libron, kiu prezentis "la internacian lingvon" Esperanton al la mondo.

Dum la 20-a jarcento tiu inter-naciismo havis ĉiam pli da influo, eĉ se ĝi estis ankoraŭ konstante kontestata de naciismo. Post la Unua Mondmilito la landaj registaroj kreis la Ligon de Nacioj (1919), la unuan ĝeneralan inter-nacian organizaĵon kiu estas preta trakti ĉiajn inter-naciajn problemojn. Antaŭe la inter-naciaj organizaĵoj traktis nur apartajn limigitajn specojn de agado, ekzemple la kunlaborado rilate al inter-naciaj telegramoj aŭ la transportado de inter-nacia poŝto. Dum la jaroj

inter la du mondmilitoj ankaŭ pliaj ne-registaraj organizaĵoj estis starigitaj. Post la Dua Mondmilito oni kreis la Unuiĝintan Naciaron (1945) por anstataŭigi la malaperintan Ligon de Nacioj. Oni starigis ankaŭ multajn novajn specialajn internaciajn organizaĵojn kiel UNESKOn (1945), la Organizon por Nutraĵo kaj Agrikulturo (1945), la Mondan Bankan Grupon (1946), la Organizon por Internacia Civila Aviado (1947), kaj la Mondan Sanan Organizon (1948). Krome, multaj novaj internaciaj ne-registaraj organizaĵoj estis kreitaj dum la lasta duono de la 20-a jarcento. Nun ekzistas pli ol 23.000 tiaj organizaĵoj.[3]

2. De Inter-naciismo al Terglobismo

Kiam alvenas la 21-a jarcento, ni homoj spertas alian transiron en nia vivmaniero, de la inter-naciismo de la 19-a kaj 20-a jarcentoj al la terglobismo de la 21-a jarcento. Ĉu oni rigardas la mondon de komerco, la mondon de komunikado, la mondon de sportoj, la mondon de distrado, la mondon de kulturo, la mondon de turismo, aŭ iun ajn alian kampon oni povas vidi, ke ni komencas vivi en tergloba komunumo. Ni moviĝas preter tiu inter-naciismo, kie la landaj registaroj ĉiam estas perantoj inter la homoj en diversaj landoj. Pro la novaj rimedoj de komunikado kaj transporto, evoluas nova speco de mondo, kie individuaj homoj de malproksimaj lokoj interagis rekte unu kun la alia senrigarde naciecon. Tamen, la naciismo, kiu estas la necesa bazo por inter-naciismo, ofte estas ankoraŭ pli fervora ol la zorgo pri la tutmonda komunumo. Rigardu, ekzemple, la Mond-Pokalajn futbalajn konkursojn aŭ la Olimpiajn Ludojn kie la patriotismo tiom floras. Je la pli serioza flanko konsideru la multajn etnajn militojn okazantajn en diversaj partoj de la mondo.

Ne ĉiuj konscias pri la grava diferenco inter "inter-naciismo" kaj "terglobismo". Fakte, multaj personoj ankoraŭ uzas tiujn terminojn sendistinge. Por helpi klarigi ĉi tiun distingon, mi kutime uzas du figurojn. La unua estas mapo de la mondo, kie la diversaj landoj estas en diversaj koloroj kaj kie ĉiu nacio-ŝtato havas difinitan linion ĉirkaŭ si. Tio estas perfekta figuro por inter-naciismo. La dua figuro estas foto de la Tero rigardata el la spaco, kie oni vidas la planedon tute sen landlimoj. Ĉi tio estas la ĝusta figuro por terglobismo.

3. La Nova Situacio

Kelkaj grandaj ŝanĝoj devos okazi dum ni transiros de la inter-naciismo de la 20-a jarcento al la terglobismo de la 21-a jarcento. Mi volas atentigi vin nur pri tri el ili.

Unue, ni devos ŝanĝi la kadron, en kiu ni vidas nin mem. Kompreneble, ni ankoraŭ vidos nin kiel membrojn de niaj familioj kaj de niaj etnaj grupoj. Ni ankoraŭ vidos nin kiel membrojn de niaj landaj komunumoj – kiel franca aŭ angla aŭ germana aŭ japana aŭ ĉina aŭ brazila. Tamen ni devos samtempe vidi nin ankaŭ kiel membrojn de la tergloba komunumo, kiel civitanojn de la planedo.[4] Plue, nia ekzisto kiel parto de tiu tergloba komunumo devos havi prioritaton super nia membreco en nia nacia komunumo. Ĝis okazos en nia kompreno la ŝanĝo pri tio kiu komunumo estas pli grava al ni, ni ankoraŭ estos en la 20-jarcenta inter-naciismo, ne en la 21-a jarcenta terglobismo.

Due, oni devos ŝanĝi la politikan organizon de nia tergloba komunumo. La Unuiĝinta Naciario estas bona ekzemplo de inter-nacia organizaĵo. Ĝi estas organizaĵo de la landaj registaroj, fare de la landaj registaroj, kaj por la landaj registaroj. Tio estas konfederacio, ne federacio. Konfederacio ne estas taŭga organizaĵo por la interagado inter la individuaj civitanoj de Tero. La landaj reprezentantoj ĉe la U.N. ne estas voĉdonitaj de la popoloj. Male, ili estas nomitaj de, kaj pagitaj de, la landaj registaroj, kiujn ili reprezentas. La landaj registaroj celas ĉefe antaŭenigi tion, kio estas bona por sia propra nacio-ŝtato. La bonfarto de la tutmonda komunumo estas por ili nur duaranga afero. En konfederacio kiel la U.N. ĉi tiuj landaj reprezentantoj ankaŭ ne povas krei leĝojn kiujn individuoj devas obei. Ili povas nur adopti rezoluciojn aŭ proponi traktatojn, kiuj poste validiĝos nur por tiuj landaj registaroj, kiuj subskribos kaj ratifikos tiun specifan traktaton.

Tergloba politika organizaĵo por la tergloba komunumo devos esti ne konfederacio kiel estas la Unuiĝinta Naciario sed demokrata monda federacio por la individuaj homoj de la mondo, kie la elektitaj reprezentantoj kun salajroj pagataj de la tutmonda registaro havas la taskon pritrakti la problemojn de la tutmonda komunumo. La landaj registaroj ankoraŭ ekzistas, sed ili fokusos sian atenton al tiuj problemoj, kiuj ekzistas interne de la landaj komunumoj. Pensu pri la sistemo en Usono kie la diversaj ŝtataj registaroj traktas problemojn interne de tiuj

ŝtatoj dum la Usona federala registaro traktas problemojn de la tuta lando. Tia federala sistemo ĉe la tutmonda nivelo limigos ankaŭ la influon de malmultaj potencaj landaj registaroj, kiuj povas superregi la ekzistantan inter-nacian sistemon.

Trie, oni devos ŝanĝi la manieron, laŭ kiu lingvoj estas uzataj en la tergloba komunumo. En inter-nacia komunikado, oni uzas naciajn lingvojn kune kun tradukistoj kaj interpretistoj. Male, kiam oni ŝanĝos al tutmonda vidpunkto kaj havos tergloban demokratian federacion, oni devos havi tergloban lingvon por diskuti kaj argumenti pri la problemoj kaj politikoj de tiu tergloba komunumo. La uzo de naciaj lingvoj estos limigita plejparte al komunikado interne de la naciaj komunumoj. Tia sistemo limigos ankaŭ la influon de malmultaj "pli gravaj" naciaj lingvoj, kiuj povas superregi la nuntempan inter-nacian sistemon.

En la kunteksto de ĉi tiu diskuto pri la transiro de inter-naciismo al terglobismo mi opinias, ke vi komprenos kial mi oponas la ideon nomi Esperanton la "inter-nacia lingvo," malgraŭ la fakto, ke Zamenhof mem uzis tiun esprimon por ĝi antaŭ multaj jaroj. La ĉefa celo de Esperanto ne estas provizi lingvon por uzo en inter-naciaj instancoj de oficialaj reprezentantoj de landaj registaroj. La landaj registaroj kutime povas dungi interpretistojn kaj tradukistojn, por ke ili povu uzi malmultajn naciajn lingvojn. (Tamen, Esperanto povus esti tre utila kaj kostoŝpara ilo eĉ por ili.[5])

Sed Esperanto estas ĉefe por ordinaraj homoj kiam ili interagis kiel membroj de la tergloba komunumo, sen mediacio fare de naciaj registaroj aŭ bezono de tradukistoj kaj interpretistoj. Sekve, mi opinias, ke ni ĉiam devus aludi al Esperanto kiel "la tergloba lingvo" aŭ "la tutmonda lingvo."

La dediĉeco de Esperantistoj uzi Esperanton helpas nin moviĝi preter inter-naciismo al terglobismo. Ĉiu lingvo estas la lingvo de iu komunumo. Esperanto estas la lingvo de komunumo de homoj unuiĝintaj ne pro nia geografia proksimeco sed pro nia dediĉo al idealoj. Ĉi tiuj idealoj estas egalaj lingvorajtoj, demokrata interŝanĝo de ideoj, kaj la unueco de la homa familio.[6] Esperanto estas la lingvo, kiu reprezentas la transiron preter kaj naciismo kaj inter-naciismo al terglobismo.

4. La Tutmonda Lingva Situacio

Rilate al la nuntempa stato de la tutmonda lingvodemandado, estas grave konstati, ke la ekzistantaj internaciaj organizaĵoj estas inter-naciaj, ne terglobaj. Ili konsistas el reprezentantoj de la landaj registaroj dediĉitaj precipe al tio, kio estas bona por tiu landa registaro. La rezulto estas, ke la lingvaj politikoj de ĉi tiuj internaciaj organizaĵoj reflektas tion, kio estas bona por la landaj registaroj, aparte la registaroj de la pli potencaj nacioj-ŝtatoj. Ĉar ĉiu landa registaro volas antaŭenigi la propran nacian lingvon, la lingvoj uzataj en la internaciaj organizaĵoj kutime estas la lingvoj uzataj de la pli potencaj nacioj-ŝtatoj. Post kiam oni starigis ĉi tiujn lingvojn kiel la oficialajn lingvojn de la internaciaj organizaĵoj, diplomatoj kiuj regas ĉi tiujn lingvojn havas intereson daŭrigi ilian uzon, eĉ se ilia propra lando mem uzas aliajn lingvojn. Kelkfoje ilia dungado multe dependas de ilia kapablo uzi tiujn naciajn lingvojn de la pli potencaj landoj.

Dum neniu tergloba instanco ekzistas por trakti la demandon, kiu lingva politiko estas plej bona finfine por la tergloba komunumo, ni povas anticipi, ke inter-naciaj organizaĵoj daŭrigos sian politikon rajtigi la uzon de la lingvoj de la plej potencaj nacioj-ŝtatoj. Plue, ĉar la uzo de unusola lingvo funkcias multe pli efike ol eĉ du aŭ tri lingvoj, ni povas anticipi, ke interne de inter-naciaj organizaĵoj, la angla pli kaj pli iĝos la elektita lingvo. Ĉi tiu impeto de la angla signifas, ke ĝi iomgrade iĝos la lingvo de la monda komunumo eĉ ekster ĉi tiuj inter-naciaj organizaĵoj. Kelkaj el la pli influhavaj landaj registaroj kies lingvo estas alia ol la angla ankoraŭ penas antaŭenigi sian nacian lingvon por uzo en inter-naciaj organizaĵoj, sed tia "mult-lingva" politiko ne povos finfine sukcesi. La multe pli granda efikeco de la uzo de unusola lingvo plus la rapide kreskanta uzo de la angla ne permesos tion. La sola realisma alternativo al la akcepto de la angla kiel la monda lingvo estas la adopto de neŭtrala helplingvo kiel la tergloba lingvo. Bedaŭrinde ju pli longe la neanglaparolantaj landoj prokrastos la konsideron kaj efektivigadon de ĉi tiu ebleco, des malpli la ŝanco, ke oni povos efektivigi ĝin.[7]

Ni devas denove emfazi, ke inter-naciismo ne estas la sama kiel terglobismo. Inter-naciaj organizaĵoj kreis situacion kie unu nacia lingvo, kiu estas la denaska lingvo de malpli ol ses elcentoj de la monda loĝantaro[8], estas la ĉefa lingvo por inter-nacia komunikado. Laŭ

tergloba vidpunkto tio estas maljusta. Inter-naciaj organizaĵoj kreis ankaŭ situacion kie unu landa registaro, kiu entenas malpli ol kvin elcentojn de la monda loĝantaro, estas la reganta potenco en la mondo. Laŭ tergloba vidpunkto ankaŭ tio estas maljusta. Ni devas uzi ĉiun influon, kiun ni havas, por persvadi niajn landajn registarojn adopti pli tergloban vidpunkton kiam ili voĉdonas en inter-naciaj organizaĵoj, aparte rilate al la mondlingva demando.

Ĉiuj devus konstati kiom grava estas la decido pri monda lingvo. La homaro nun elektas la fundamentan lingvon, kiu iom post iom evoluos en la lingvon por la tutmonda komunumo dum la cetero de la tempo. Konsidere la diversajn specojn de skribataj kaj registrataj informoj, kiujn ni nun havas, oni multe pli malfacile efektivigos lingvan ŝanĝon en la estonteco ol en la pasinteco. Sendube kelkaj ŝanĝoj en la estonta monda lingvo okazos. Oni kompreneble aldonos novajn vortojn kaj adoptos novajn esprimmanierojn, sed oni ne facile povos modifi la centran kernon de iu ekzistanta lingvo. Tamen tio estas precize la loko kie okazas la plej grandaj neregulaĵoj en la naciaj lingvoj kiel la angla.

5. Eduki la Novan Generacion

Do kiel oni devus eduki la novan generacion? Kio estas la situacio por individuoj en la nuntempa monda komunumo? Infanoj kaj gejunuloj komencas hejme lerni sian etnan lingvon, kiu iĝas grava parto de ilia persona identeco. Preskaŭ ĉiuj devige lernos almenaŭ unu oficialan nacian lingvon. Kelkaj gejunuloj lernos ankaŭ aliajn lingvojn. Por tiuj, kies unua lingvo estas ne la angla, la registaro probable postulos, ke ili lernu ĝin, ĉar nuntempe ĝi estas la superrega lingvo en la internacia komunikado. Tamen samtempe ni devus peni prepari niajn gelernantojn por vivi en la tergloba komunumo. Ni povas instrui ilin vidi sin unue kiel membrojn de la tergloba Esperanta komunumo kaj nur due kiel membrojn de nacia komunumo, en kiu ili hazarde naskiĝis. Per instruado de Esperanto ni povos helpi ilin iĝi bonaj mondĉivitanoj kaj komfortaj membroj en nia evoluanta tergloba komunumo.[9]

Esti Esperantisto estas tre malsama afero ol esti parto de iu nacia komunumo. Ĉiuj naskiĝis en iu nacia komunumo. Oni ne elektis naskiĝi en ĉi tiu aŭ tiu nacia komunumo. Ni simple trovas nin en unu lando aŭ

alia. Kiam ni direktas nian atenton al nia nacia komunumo kaj nia deveno ni necese rigardas malantaŭen al tio, kio hazarde okazis ĉe ni en la pasinteco. Tio estas io kion ni tute ne povas ŝanĝi. Aliflanke, ni Esperantistoj rigardas antaŭen al tio, kio devus okazi kaj al tio, kion ni povas helpi okazigi kaj nun kaj en la estonteco. Ni konscie elektis iĝi kaj daŭre elektas resti parto de nia jam ekzistanta evoluanta Esperanta terglobo komunumo. Ni intence kreas nian identecon. Ĝi, male al la nacia identeco, ne estas io ekster nia rego. Ni kaj niaj gelernantoj jam estas membroj de disvolviĝanta progresema terglobo komunumo. Se aliuloj elektus ne aliĝi al nia feliĉa bonintenca komunumo, ili estas la malgajnantoj.

NOTOJ

[1] Unu tre leginda anglalingva superrigardo de la grandaj ŝanĝoj en la homara situacio estas Kenneth E. Boulding, THE MEANING OF THE TWENTIETH CENTURY [LA SIGNIFO DE LA DUDEKA JARCENTO] (Novjorko: Harper & Row, 1964). Vidu aparte la unuan ĉapitron.

[2] Vidu K. Boulding, THE MEANING OF THE TWENTIETH CENTURY [LA SIGNIFO DE LA DUDEKA JARCENTO], ĉapitroj 2 kaj 3.

[3] Vidu Hilary French, "Coping with Ecological Globalization" ["Trakti kun Ekologia Tutmondiĝo"] en Lester R. Brown, Christopher Flavin, Hilary French, kaj aliuloj, (red.), STATE OF THE WORLD 2000 [STATO DE LA MONDO 2000] (New York NY: W.W. Norton & Company, 2000), paĝo 202.

[4] Inter la multaj libroj lastatempe eldonitaj pri ĉi tiu temo, mi citu nur du. Unu estas PLANETHOOD [PLANEDECO] de Benjamin B. Ferencz kaj Ken Keyes, Jr. (Coos Bay, Oregon 97420: Loveline Books, 1991). La alia estas WORLD CITIZENSHIP AND GOVERNMENT: COSMOPOLITAN IDEAS IN THE HISTORY OF WESTERN POLITICAL THOUGHT [MONDA CIVITANECO KAJ REGISTRARO: KOSMOPOLITAJ IDEOJ EN LA HISTORIO DE OKCIDENTA POLITIKA PENSO] de Derek Heater (Hampshire, England RG21 6XS: Macmillan, 1996).

[5] Vidu Richard Selten (red.), LA KOSTOJ DE LA EŬROPA LINGVA (NE)KOMINIKADO (Rome: "EsPERanto Radikala Asocio, 1997). Ĉi tiu libro estas havebla ankaŭ en la itala kaj la angla lingvoj.

[6] Pli kompletan deklaron pri ĉi tiuj idealoj oni povas trovi en "La Manifesto de Prago" adoptita ĉe la 81a Universala Kongreso of Esperanto en Prago en 1996 kaj eldonita en ESPERANTO, Septembro 1996 (N-ro 1084), paĝo 146.

[7] Vidu Ronald J. Glossop, "Language Policy and a Just World Order" [Lingva Politiko kaj Justa Monda Ordo"], ALTERNATIVES, XIII (1988), 395-409, aparte paĝo 407.

[8] THE WORLD ALMANAC AND BOOK OF FACTS, 2001, paĝo 301, indikas ke en meza 2000 estis 341 milionoj da denaskaj parolantoj de la angla en la mondo. Sur paĝo 862 oni povas legi, ke la loĝantaro de la mondo en la jaro 2000 estis 6 080 milionoj da homoj. La necesa divido informas nin, ke la proporcio de la monda loĝantaro, kies unua lingvo estas la angla, estas 5.6%. Ĉi tiu libro, ankaŭ en paĝo 301, informas nin, ke estas aliaj lingvoj – la ĉina, la hinda, kaj eble la hispana – kiuj havas pli da denaskaj parolantoj ol la angla.

[9] Por libro-longa historia analizo en Esperanto, kiu reflektas opiniojn similajn al tiuj esprimataj en ĉi tiu prelego, vidu Giordano Moya Escayola, SURVOJE AL UNIVERSALA CIVILIZACIO (Barcelona: Barcelona Esperanto-Centro, 1995).

Ronald J. Glossop,

<rglossop@siue.edu>, Profesoro Emerita de Filozofiaj Studoj, Sud-Illinojsa Universitato en Edwardsville, Edwardsville, IL 62026, Usono



www.edukado.net

edukado.net

La servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto

Recenzo

Elisabetta Vilisics Formaggio:

LUDU KUN NI! 2.

Propedeŭtika lingvo-kurso por infanoj. Roma. ERA, 2000. 128 p.

La libro estas daŭrigo de la unua volumo (eldonita en 1994), kiu pritraktis la bazajn gramatikajn kaj leksikajn elementojn de Esperanto. Tiu dua parto harmonie konstruiĝas je la antaŭaj bazoj kaj pluperfektigas la konojn de la infanoj pri la verbotempoj, modoj, esprimoj pri spaco, tempo, kaŭzo kaj celo helpe de adverboj, prepozicioj kaj esprimoj. Ankaŭ komparacio, vortfarado, -IG, -IĜ kaj multaj afiksoj estas tie pritraktataj.

La prezento de la nova materialo estas laŭŝtupe strukturigita, perbilde bone ilustrita, ne nur amuze, sed ankaŭ vidigante la esencon de la direndaĵoj. La leksikajoj kaj paroltemoj rilatas al la infana vivo: familia kaj lerneja medio, geografiaj, sociaj, natursciencaj kaj interkulturaj temoj. La en Eŭropo verkita lernilo ne forgesas informi pri la foraj kontinentoj kaj landoj, pri ties kutimoj kaj mondo.

Strukture, kiel ankaŭ la unua volumo, tiu ĉi ne estas dividita je tradiciaj lecionoj, kio povas esti stranga por la klasikaj uzantoj. La libro entenas 4 grandajn ĉapitrojn, ene de kiuj 1-2 paĝoj pritraktas la koncernajn erojn, identigeblajn en la librofina enhavtabelo (kies aldono estas bona novaĵo kompare kun la unua libro).

La lernolibro estas fakte laborkajero, kiun la 8-10-jaruloj povas kolorigi (kompensi la pro-ekonomian mankon) kaj en kiu ili enskribas ĉiujn solvojn de la ekzercoj, kreas siajn vortlistojn, solvas la taskojn, enigmojn, eĉ povas resumi nacilingve la memorindajn gramatikajn regulojn.

La tekstoj estas dialogformaj, malofte rakontaj, la ekzercoj spritaj, variaj kaj kreivaj.

Kelkaj kantoj kaj ludoj buntigas la interesan lernilon. Laŭdo al la verkistino kaj ŝiaj kolegoj kaj amikoj. Estas bone ke naskiĝis la daŭrigo



de la unua volumo kiun tiutempe multe subtenis kaj influis la sciencaj konsilistoj de la paderborna LOI-ekperimentprojekto, pri kies kunlaboro estas neniu aludo en la dua volumo. La multjaraj instruistaj spertoj kaj entuziasmo inspiris nian koleginon krei tre utilan kaj bone uzeblan materialon por la instruado de Esperanto al 10-jaraj infanoj.

Katalin Kováts

FIPLV kaj ILEI kunlaboras

Post amika interdiskutado inter du prezidantoj samlandaj, Kep Enderby de UEA kaj Denis Cunningham de FIPLV (Fédération Internationale des Professeurs de Langues Vivantes) la tutmonda konsilantaro de FIPLV tralegis la statutojn de ILEI kaj kore akceptis la membriĝvarbon. Por vekti imagon pri estonta kunlaborado jen skizo de la ĉefaj punktoj el la statutoj de FIPLV. FIPLV estas tutmonda federacio de asocioj de instruistoj de vivantaj lingvoj. Ĝi estas ne-monprofita, aŭtonoma, sendependa Ne-Registara Organizaĵo kun konsultaj rilatoj kun UNESKO. Unu grava kondiĉo je membriĝo estas ke 'la asocioj kuraĝigu pozitivajn sintenojn je diversaj lingvoj, kulturoj kaj nacioj, kaj ne diskriminaci kontraŭ iu ajn persono surbaze de koloro, raso, sekso, lingvo, politika opinio, kredo aŭ religia konvinkiĝo'. La celoj bone kongruas al tiuj de ILEI aldonante 'kuraĝigi membrojn de diferencaj lingvoasocioj en la sama lando kunlabori kaj promocii iliajn komunajn zorgojn rilate al instruado kaj lernado de vivantaj lingvoj'. Pri interna lingvo-politiko, la titolo estas oficiale en la franca, la statutoj aperas en la oficialaj lingvoj de UNESKO kaj la internaciaj unulingvaj membraj asocioj, kaj povas esti tradukitaj en iun ajn aldonan lingvon. Kiam temas pri disputo, la angla versio de la statutoj estas la sola jura aŭtoritato. Ĉe ĉiu kunveno de la federacio la partoprenantoj rajtas utiligi sian preferatan lingvon. Ĉe tutmondaj kongresoj de FIPLV almenaŭ tri kongreslingvoj antaŭanoncendas.

La tutmonda asembleo, kiu kunvenadas almenaŭ trijare, konsistas el la administraj oficistoj, la regionaj reprezentantoj kaj du delegitoj de ĉiu membra organizaĵo. Tiuj havas du voĉojn kiujn ili povas doni aŭ helikpoŝte aŭ per anstataŭanto. La plej gravaj notindaj respondecoj de la administra komitato kunvenante dufoje jare estas: 'iniciati laŭ la celoj de la federacio kaj daŭrigi regulan interkomunikadon kun la membraj asocioj. La regionoj respondecas pri la aranĝado de regiona kunveno en la formato de asembleo.

Serĉata tradukemulo kiu pretas traduki la statutojn kaj la elektoregularon de FIPLV el la angla en Esperanton (12 paĝoj A4) bv. sin anonci. Retadreso de FIPLV: <webmaster@fiplv.org>; www.FIPLV.org.

Jennifer Bishop,
Reprezentanto de ILEI ĉe FIPLV

El la landoj kaj sekcioj

Francio

Por helpi dum kolokvo okazigotan la 8an kaj 9an de februaro 2002 sub la aŭspicioj de la Ministerio de la Junularo kaj Sportoj organizita de Esperanto-France, GEE-estraro demandas al la gekolegoj, ĉu ili havus esperantan materialon uzatan en infanlernejoj por kvinjaraj infanoj?

Se eblas bv. sendi al la suba adreso: ĉu referencon aŭ kopion de via lernolibro, ĉu fabelojn, ĉu kantetojn, ĉu kasedojn; ktp.

Ni antaŭdankas vin por via helpo!

Jo CATIL GEE (Grupo de Esperantistaj Edukistoj) 5, rue des Calabres
FR-69330 MEYZIEU, Francio.

Por subteni la malfermon de esperanto-kurso en Mezlernejo/Liceo en sud-okcidenta regiono de Francio (urbo Perigueux), mi alvokas la geinstruistojn kiuj havus ĉu klason, ĉu intergrupan klason kie oni instruas(os) esperanton por apogi tiun malfermon ĉefe al la estro de la Mezlernejo/Liceo kaj poste plani estontajn interŝanĝojn.

En la intergrupa klaso antaŭvidita estas studentoj inter 13 ĝis 17jaraj en la nivelo de komencantoj. Nia kolego hispana instruisto tre ŝatus havi kontaktojn en latinaj landoj se eblas kaj li agus en la kadro de la Projekto "Socrates-Comenius". Se vi havus konatulojn, bonvolu resendi tiun mesaĝon laŭnecese al ili. Bonvolu rilati rete al josemanuel.soria@wanadoo.fr aŭ perletere al S-ro SORIA José Manuel (hispana instruisto) *Résidence Paul Bert Bât.A - Porte 9 Chemin de Halage FR-24000 Périgueux. Tel : (33)05 53 06 77 68.*

Alvoko!

Pri via eventuala adresosŝanĝiĝo NEPRE informu la sekretariojn aŭ la koncernan personon de via sekcio por ke la ŝanĝo eniru la ILEI-registradon!

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: bmaxey@visi.net

Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin

Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

Terminara: Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

FIPLV (Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj)

Reprezentanto de ILEI: Jennifer Bishop

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civadde Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; Jean-Pierre Boulet, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60;

Mireille Grosjean, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, <grosjean9@caramail.com>

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>, postĝirkonto: 682117-7 Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS.* Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64.* UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 39 de Jarlibro 2001. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: jozefo@nl-papa.hu; jozefo_nemeth@hotmail.com, tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896). La familia stato kaj loĝloko de nia vic-redaktoro ŝanĝiĝis: bv. uzi nur la retadreson katalin@ikso.net! La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leg-handikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 22-an de novembro 2001, **redaktofino por la sekva numero: la 15-a de januaro 2002.**

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana
✉: selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105
✉: kjand@ozemail.com.au

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
✉: raymond.wylleman@pi.be

Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, GB-North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratiškovice 938
✉: mmelicharek@iol.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
✉: zdchen@public.wh.hb.cn

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito
✉: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,
✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürrheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Iház
✉: jozefo@nl-papa.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran
✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma
✉: vmadella@tin.it

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001
✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
✉: ileicat@hotmail.com

Kroatio/KEL: Ankica Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,
✉: ankica.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana

✉: kubesp@ip.etecca.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
✉: iei001@worldonline.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad
✉: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap. 7. RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloenzaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: François Randin, Str. Vallombreuse 14, CH-1004 Lausanne
✉: francisko@courrier.com

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,
✉: esp.togo@cafe.tg

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)
✉: 72644.2450@compuserve.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino:

Nimeta Kulenović, Branica Sarajevo 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región
✉: strigo@ctcreuna.cl

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 94, EE-3053 Keila

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Norðurbraut 33, I.h., IS-220 Hafnarfjörður,
✉: loftur@skyr.is

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Jugoslavio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak
✉: radp@ptt.yu

Kongo: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaire)

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José
✉: miaumiau1@racsa.co.cr

Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do KR-499-900
✉: so@kns.kangnam.ac.kr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-Wellington 1
✉: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugallio: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - r/c esq Vale Grande, PT-1675 Pontinha

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.
✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-70000 Taškent, CIS
✉: eugeny@esper.gimli.com

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado VE-70782, Caracas 1071 A